


# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 274 (41) - KVINA EPOKO

JUNION 1991

*legu somere*



**ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO**  **KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO**

(Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785)  
 Apartat/Poŝtkesto 290 - 08200 Sabadell - Catalunya/Katalunio. Tel. (93)716.36.33  
 (ekde lundo ĝis vendredo inter la 20a kaj 22a h.). FAX (93)727.42.08. Kolektiva  
 membro de Kooperativo de Literatura Foiro. Kun laborinterkonsento kun la Akade-  
 mio Internacia de la Sciencoj San Marino.

**KOTIZOJ POR LA JARO 1991:** Individua Abonanta Membro 1.600 p-toj; Individua  
 Subtenanta Membro 3.200 p-toj; Individua Dumviva Membro 32.000 p-toj; Kolektiva  
 Membro 3200 p-toj.

**BANKO:** Caixa de Pensions - agència 461 - Sabadell - konto: 550-53.

**PLENUMKOMITATO DE KEA:** Prezidanto: Antoni Grau; Vicprezidanto: Maria  
 Nuez-Garcés; Ĝenerala Sekretario: Llibert Puig; Kasisto: Óscar Puig; Komitata-  
 noj: Carles Berga, Bartomeu Costa, Josep Franquesa, Jordi Graells, Joan R. Gui-  
 ñón, Ĝirona Espero, Daniel Rubió, Josep M. Serrano.

**KONTROLA KOMISIONO:** Tomàs Alberich, Lluís Armadans, Ricard Jordana.

**KATALUNA ESPERANTISTO:** Hektor Alos, Ferriol Macip, Llibert Puig.

**KONSERVANTARO DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ:** Gabriel Mora i Ara-  
 na (prezidanto), Jordi Carbonell i Pinyol, Timothy Brian Carr (florluda majstro), Ma-  
 nuel Casanoves i Casals, Bernard Golden (florluda majstro), Salvador Gumà i Cla-  
 vell, Miguel Gutiérrez Adúriz, Abel Montagut i Masip, Giorgio Silfer (florluda majs-  
 tro), Krystina Ungar (florluda majstro), Joan Ramon Guíñón i Roset (sekretario).

**FLORLUDAJ MAJSTROJ:** Clarence Bicknell (3aj IFL, Olot 1913), Artur Domènech  
 i Mas (6aj IFL, Reus 1916), Marià Solà i Montserrat (6aj IFL, Reus 1916), Josep  
 Ventura i Freixas (8aj IFL, Olot 1921), Jaume Grau i Casas (9aj IFL, Manresa  
 1923), Bernard Golden (20aj IFL, Vilanova i la Geltrú 1980), Giorgio Silfer (24aj IFL,  
 Olot 1984), Timothy Brian Carr (28aj IFL, Barcelona 1988), Krystina Ungar (30aj  
 IFL, Palamós 1990).

**PEDAGOGIA KOMISIONO:** Lluís de Yzaguirre, Abel Montagut, Joan Torres, Jo-  
 sep Tordera, Manuel Marqués.

**VORTARA KOMISIONO:** Jordi Carbonell i Pinyol - av. Paralel, 96-6è - tel. (h)  
 329.24.81, (l) 241.94.11 - 08015 Barcelona.

**KOMARKAJ DELEGITOJ:** Alt Penedès, Baix Penedès, Garraf: Joan Inglada i  
 Roig - St. Magí, 20-3r - tel (93)893.71.76 - 08800 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Ga-  
 rrotxa, Ripollès: Joan Torres i Nalda - Escola Llar - Ctra. de la Canya, s/n - tel.  
 (972)26.38.29 - 17800 Olot (Garrotxa); Gironès, Alt Empordà, Baix Empordà, La  
 Selva: Ĝirona Espero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Tarragonès, Alt  
 Camp, Baix Camp: Josep M. Serrano - Apartat 482 - 43080 Tarragona (Tarrag-  
 onès); Baix Ebre, Montsià: Josep M. Altadill - Berenguer IV, 23 - tel. (973)44.20.09  
 - 43500 Tortosa (Baix Ebre); Illes Balears: Xavier Margais i Basi - Orient, 60 - tel.  
 (971)61.38.30 - 07110 Bunyola (Mallorca); Catalunya Nord: Joan Fernández -  
 Henri Matisse, 21 - F-66000 Perpinyà (Rosselló).

**KOLEKTIVAJ MEMBROJ:** Centre d'Esperanto Sabadell - Apartat 407 - Papa  
 Pius XI, 130 - tel. (93)716.36.33 - 08200 Sabadell (Vallès Occidental); Centre d'Es-  
 tudis de la Biblioteca-Museu Balaguer/Esperanto-Grupo - St. Gervasi, 45 -  
 08200 Vilanova i la Geltrú (Garraf); Centre Excursionista Puigcastellar/Esperan-  
 to-Grupo - St. Josep, 20 - 08922 Santa Coloma de Gramenet (Barcelonès); Club  
 d'Amics de la Unesco de Catalunya/Departament d'Esperanto - Mallorca, 207-  
 pral. - tel. (93)253.95.07 - 08036 Barcelona (Barcelonès); Esperanto-Centro Ta-  
 rragona - Apartat 1236 - 43080 Tarragona (Tarragonès); Esperanto-Fako "S. C.  
 Joventut Terrasença" - St. Francesc, 52 - 08221 Terrassa (Vallès Occidental) -  
 Esperanto-Grupo "Jozefo Anglès" - Apartat 336 - 08190 Sant Cugat del Vallès  
 (Vallès Occidental); Firma Tero Esperanto-Fako Centre Comarcal Lleidatà -  
 Gran Via, 592 - 08007 Barcelona (Barcelonès); Grup Esperantista Sant Pau d'Or-  
 dal - Dr. Zamenhof, 12 - tel. (93)899.30.33 - Sant Pau d'Ordal (Garraf); Ĝirona Es-  
 pero - Apartat 509 - 17080 Girona (Gironès); Hispana Esperanto-Fervoĵista Aso-  
 cio - Apartat 15027 - 08080 Barcelona; Secció d'Esperanto Centre d'Estudis  
 Comarcals d'Igualada - Baixada de Sant Nicolau, 21 - 08700 Igualada (Anoia).  
 Dipòsit Legal: B-27362 - 1982. Presita ĉe Ràpid Graf. (93)725.50.91. Sabadell.

**S**omero estas tiu periodo de la jaro, kiam ni ĉiuj pli akre ekkons-  
 cias, ke endas legi tiun amason da libroj kolektitan dum la jaro.

Por tiuj sezonaj legemuloj ni klopodis iom so-  
 merigi nian modestan revuon, aldonante du  
 rakontojn: la aventurojn de kara vojaĝulo en  
 Rumanio kaj simpligitan adapton de famega  
 rakonteto de nia nuntempa nacia literaturo.  
 Malkoverte vi eĉ povos multoblige la eblecojn  
 legi...

Somero estas ripoza sezono, sed ĉi-jare niaj  
 aktivuloj devos ankaŭ labori: ekestas preta  
 nova renovigita eldono de la Zagreba Meto-  
 do. Ĉiu fakte havas sian taskon: ĉu vi jam  
 sendis vian aliĝilon por nia novembra kongre-  
 so en Taragono? Ek!

Ĝuu vian someron... surplage aŭ en klimatigi-  
 ta laborejo!

## Freqüencias

Pro bedaŭrindaj problemoj ĉe KEJ, kiuj feliĉe ek-  
 solviĝas, la revuo **Freqüencias** devis lastmomente  
 malfruigi sian aperon. Tion, cetere, la redaktoroj uti-  
 ligas por ankoraŭ plibonigi la unuan numeron kaj pli  
 profunde prepari la sekvajn.

Kataluna Esperanto-Asocio kaj Ĝirona Espero  
 jam certigis la aperon de tiu serioze planita projekto.  
 Ĝi simple prokrastiĝis al septembro.

## Pardonpeto

La translogiĝo de la du redaktoroj Ferriol kaj  
 Hektor iom sentempigis ilin kaj ege malhelpis la uza-  
 don de potenca mikrokomputilo por la farado de nia  
**Kataluna Esperantisto**. Ni pardonpetas kaj prome-  
 sas ĝustatempe fari la sekvan.

## 25 Kataluna Kongreso de Esperanto

### William Auld ĉe ni

Jen finfine la aliĝilo. Se vi ĝin plenigos tuj per via enskribiĝo, vi trafos la plej malmultekostan kotizon kaj krome vi ege helpas la organizantojn. Elkoran kaj anticipan dankon al tiuj, kiuj frue aliĝos.

La kongresaj perpar-laboroj bone progresas kaj sekve ni informas pri lastaj novaĵoj.

La plej eminenta vivanta poeto de nia literaturo, **William Auld**, akceptis nian inviton festparoli en la Floraj Ludoj. Ni dankas lian pretecon kunlabori al la sukcesigo de nia kongreso.

Pri la arta programo konfirmiĝis la partopreno de la kanzonisto **Solo**, bona muzikisto kaj poeto, kiu prezentos al la Kongreso sian ĵus aperintan diskon (mendeblan en nia libroservo). La distraj vesperoj okazos en la moderna salono de la restoracio Barquet (**foto**), kie krome la gekongresanoj povos danci, ĉar tie ekzistas taŭga muzik-instalaĵo.

Rimarku, ke ĉi-foje ni ekskursos duontage, kaj espereble tute senpage, ĉar preskaŭ certe ni ricevos subvencion tiucelan. Menciuj tamen en la aliĝilo vian pretecon ekskursi, ĉar ni nepre bezonas kalkuli la mendotajn aŭtoĉarojn.

Dum la solena inaŭguro, kiu probable okazos en la Urbodomo, la Kongreso omaĝos la memoron de la loka forpasinta samideano Evelí Calvet.



Salono de restoracio Barquet, kie okazos la distraj vesperoj dum nia kongreso

## Barcelono

La 22an de aprilo Carles Berga prelegis nome de nia Asocio en Escola d'Adults de Trinitat Vella; ene de la Kultura Semajno.

La 23an de aprilo, dum la libro-tago, oni ekspoziciis Esperanto-librojn en Rambles kun mirinda vendo-sukceso.

Inter la 6a kaj la 12a de majo oni povis vidi en Institut de loga Cinquè Sol 42-afiŝan ekspozicion de Centro de Esperanto Sabadell.

La 10an de majo laŭ afabla invito de Ràdio Contrabanda kelkaj junuloj muntis budon en Cotxeres de Sants pere de materialo de Girona Espero.

Ĉefa motoro de tiu agado en Barcelono estas nia aktivega Carles Berga.

## Zagreba metodo

La Zagreba Metodo estas la nuntempa Esperanto-lernolibro plej tradukita divers-lingven. La nuna versio, tamen, ankoraŭ ne instruas sendependiĝajn metodojn, kion kelkaj atendas senpacience (feliĉe ne temas pri Ljubljana Metodo).

Nu, post diligenta plur-jara laboro jam pretas tute nova lernolibro por katalunoj bazita sur tiu metodo. Nia versio estas tute adaptita al katalun-lingvanoj kaj enhavas multege pli da ekzercoj kaj klarigoj ol la originalo.

Antaŭ la eldono, kiu espereble estos baldaŭa, la libron tra-kontrolas pluraj instruistoj. Nia Asocio plezure sendos la laserajn pres-provojn de la libro al tiuj grupoj aŭ aktivuloj, kiuj ilin petos.



## Iru senmanie Rumanien

**P**asint-numere oni tute brile skizis, kion mi vizitis kaj faris dum mia monĉuma veturado (jam sep-monata kaj daŭre senproblema). Sed tie oni supozis min en lu-goslavio, ne en Bulgario; kaj tute male estis. Mi preferis alfronti la mitralan vortumadon de Ljubĉjo (la malvulgara amiko), antaŭ ol renkonti tiujn pli realajn jugoslavajn mitralilojn.

Post feliĉi dum monato ĉe Attila en Budapeŝto (kie mi kontaktis tre famajn kaj karajn esperantistojn, i.a. Adolf, petveture el Katalunio ĝis Budapeŝto en tri tagojn: li refoje fingre majstris), mi pretis pafi mian kamionetnjon Rumanien.

Akompanis min granda kuraĝigilo kaj pelisto: Ĉoe Tae-Sok, redaktoro de "la espero el Koreio". Mia kara diesel-kunpaganto kaj temp-beligisto. Pli ol 2500 kilometrojn ni kune ĝuis tra Hungario, Rumanio kaj Bulgario. Ĉie ni trovis har-hirtige afablajn esperantistojn. Ni lernis tosti, danki, kanti, krii kaj diri "mi tute satas, bonvolu ne pli da frandaĵoj", en ĉiaj lingvoj.

En Rumanio la komunistoj manipulis la balotojn kaj daŭre regaĉas, multaj aferoj kaj servoj iom stinkas korupt-odore. Tiel, por glate transiri landlimon, ni devis foje doni kasedojn, cigaredojn aŭ dolarojn. Sed tuj post la doganejo la lando montriĝis daŭra festo (kaj ne FASTO, kiel timige oni



Pretaj

prognozis al ni en Hungario). Certe mankas multaj varoj kaj nutraĵoj, sed oni ne tiom malsatas, kiel asertatas eksterlande. Fakte laŭ natura kaj agrikultura vidpunktoj, Rumanio ege riĉas.

La landaj aŭtovojoj estas samtempe la ĉefa strato de ĉiuj vilaĝoj. La domoj viciĝas ambaŭflanke de la ŝoseo. Tiel, de la veturilo mem, oni povas daŭre spekti la pitoreske belajn domojn, la salutemajn vilaĝanojn (ĉefe la infanoj freneze man-svingis, ofte esperante ĉokoladon, maĉ-gumon, monon aŭ tabakon), la brutojn, kokinojn kaj ĉiajn vivestaĵojn (kiujn oni devas ne nur admiri, sed ankaŭ ege atenti, ĉar ofte tute libere, kontentige kaj

senĝene promenas kaj sin paŝtas meze de la ŝoseo).

Do, ŝofori tie estis iom elĉerpige, ĉar unuflanke oni devis atenti la ravan pejzaĝon kaj fascinajn vilaĝojn, kaj aliflanke konstante rigardi la vojon, ĉar kiu ajn truo, besto, maŝino, surprizo aŭ mistero povis subite ataki la kamioneton. Eĉ en aŭto-ŝoseo mi devis ĵongle stiri, por eviti karamboli kun ali-sence veturantaj biciklantoj, bovinoj ĝuante la freŝan herbon inter-trakan, vendantoj de kiu ajn neimageblaĵo, ĉaroj, aŭtomobiloj pli malrapidaj ol ĉaroj, aŭ subitaj riparistoj de asfalto, laborantaj sen signala ŝirmo.

Sed vere ĉiam la pureco kaj beleco de la pejzaĝo, lando kaj



Ciganoj ĉiam ravaj kaj abundaj

Fine mi eĉ ĝojis pri la voja handikapiteco, ĉar tio devigis nin malhasti kaj tiel ni povis vere vivi, senti kaj vidi ĉion.

Vilaĝoj plej impresaj estis por ni tiuj de Transilvanio, ĉefe ĉe Karpatoj, kie ni enamiĝis al impona fantoma lago (Lacu Rosu).

Ĉie la homoj, arbaro, montaro, kamparo - mi aŭdacas supozi, eĉ maro - aspektis netuŝitaj, virgaj kaj aŭtentaj. Nur foje - ĉefe proksime de Burureŝto - aperis iu industrio aŭ real-socialisma urbo, kiu memorigis nin, ke

Kun esperantistaj bahaanoj kaj Tae-Sok en Kóloszvar



homoj forgesigis la streĉon kaŭzitan de tiuj malciviliziciaj ŝoseoj.

tamen iam Dio forpelis nin de Paradizo.

Pri esperantistoj, nur emocie mi povas paroli. Ili ĉiam helpis, sin oferis, regalis kaj prifestis nin. En Cluj/Kóloszvar kelkaj junaj espistoj samtempe baha-anas, ne mirige; bonkoraj homoj. En Timiŝoara estas la ĉefa sidejo de Rumanaj espistoj, kiuj strebas por rapide reorganiziĝi post Ĉaŭŝeskaj persekutado kaj subpremado. En Odorheiu/Securisc ni ĉeestis la naŭan Internacian Metodikan Seminarion (ekzamenigo por disdoni atestilojn pri diversgrada E-lingvokono). Ne-forgeseble kiel la gepartoprenantoj bonvenigis nin. Lavange falis sur nin demandoj ĉiaj, kisemaj ridetantuloj, amikaj proponoj, gastamaj komplezoj... Mi miris, kiom da kompetentaj homoj - ankaŭ viglaj gejunuloj - kuraĝis kaj sukcesis pasi tiujn altnivelajn ekzamenojn. Ĝenerale la rumantaj espistoj ĉame bone regis la lingvon, spite al tio, ke preskaŭ neniam havis ŝancon paroli ĝin kun alilandanoj. Kaj ne nur kiel parolis, sed kion parolis: ĉiam varmajn, sincerajn, tiklajn, rektajn kaj interesajn vortojn.

Do, korespondu kun rumanoj, vizitu, adoru, ekkonu ilin; estas granda popolo. Adresojn vi trovos en Jarlibro aŭ ĉe Hungara Esperanto-Asocio.

Post Rumanio dum du semajnoj mi amik-etose orgasmodis en Bulgario. Nun la suno jam forte batas kaj mi venis al Grekio por ĵeti min maren. Mi klopodos resti longe ĉi tie; lerni grekan, laborim, artistumi... Grekio estas genia, magia, en ĝi troviĝas kialoj kaj kialulinoj por kateni min dum tri monatoj minimume... Sed nenio certas, mi tute ne estas bona amaŭologo, mi nenion povas antaŭvidi... nur tion, ke estu ni kie ajn, ni ĉiam estos kune, pere de ĉi-revuo, Esperanto aŭ niaj koroj (ele!).

**Bombarde kisas vin,**  
Amaŭĉjo

Brave etnismo!

**Etnismo**  
ISSN 0938-9724  
RO 48 INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ 10.05.1991

**KIA SCEND!**

**Krome....**

Escolto el...  
EL LA KULTURO (LAKO) ... 6  
La skotgala lingvo ... 6  
Alto / Skotlando ...  
"Historia Chronologique  
des Pays Catholiques" ... 22  
Kraj eroj ...  
Etra/Cyru/Uralt ...  
Kion ili celas postlanta  
S U P E R S E C O N ? ...  
Goršaŭ: "Mi ne ordonis  
la intervjuon ... 13 +  
Ne plu kiampli ...  
Rakto el "ribelo" ...  
Gutulo, KARTVELOJ! ...  
"El kaj pri Azerbajĝano" ...  
USSR antaŭ la certe difarilo  
10 +

Inter estado kaj  
komo kongreso ... 20 +  
Raporto el kontraŭlovan  
urboj Triesto ... 22  
Kio fuĝi ruzoj kun ĉiuj  
malama linj ... 25 +  
Lumilo, U plej jona? 26  
Kio el ... padonj  
kaj re-erage ... 30 +  
Ĉu tio veno provoko  
lingvo-olito? ...  
Tensio ribelo ...  
Dopletta stato brutale  
kigilo la GOMMOJ en PM  
IKEL-IPROKILIO 30

Ĉu Talabani estas naiva opo  
kiamto vidante sin kun kio  
Gendarmato de la "Kurdio"  
Husain Goro? Talabani de  
siga esti la politika  
"Ĉi-momente Husain estas ti  
malferiga kiel nomo anka  
Ĉu ni ne devas profiti tion  
ĉiuj kiel kurdoj priŝtatoj  
rifuzo tiam momenton ne  
surosto la kurdoj historio  
Britaj unuonoj kaj la per  
se ĉiuj periferioj ilia ĉi-  
cento. La aliancoj armoj  
deva resti - ĉu plurej ĵ  
voj - se ĉiuj per general  
realigo kaj ĉiuj funkcion  
don de ĵurda alianco. Ĉi-  
tas plej probable ke Husain  
praktike utiligo la Talab-  
ani-homoj sur aliancoj

Malgraŭ sia bedaŭrinda aspekto, **Etnismo** estas inter la plej viglaj kaj intereseĝaj revuoj en Esperanto. Kiel informilo de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, ĝi diskonigas etnajn kaj lingvajn problemojn. Ĝia enhavo, cetere, estas sufiĉe ne eŭrop-centra, ĉar ĝi prezentas faktojn el la tuta mondo.

Se la revuo ne estas regula, tion bonege solvas la (vere) duoblaj kaj trioblaj aperantaj numeroj. Ĝuste ĝia lasta numero estas triobla kaj dispanoramas tutmondon: Kurdio, Keltio (aparte pri ĉiu kelta lando), Sovetunio (i.a. ankaŭ pri la etnaj problemoj ene de Kartvelio), Triesto, romaoj, Lesoto, Italio, Eŭskio, Tuaregio, Sorabio k.a. Ĉefe intervjuo kun John Wells, prezidanto de U.E.A., donas verdan fonon al la eldonaĵo,

kiu kaptas ioman parton de sia enhavo el la esperantistaro. La tuto fantaste disvolvigas laŭlonge de 36 mirindaj paĝoj.

- Etnismo; red. Uwe Joachim Moritz, Im Römerfeld 44, D-W-5180 Eschweiler (FRG); unuopa numero: 5 gm. (jara aliĝo al IKEL: 22 gm; 11 gm por studentoj).

Via Fora: revuo por kulturemuloj

**Via fora!**

29

**enllaç**

An 8  
Volum III  
Hivern del 1991

Via Fora! estas kultura revuo katalunlingva, kiun diligente eldonas la malgranda sed eksterordinare aktivega asocio **Enllaç**. Per ĝia altnivela kaj serioza enhavo dum jaroj, ĝi atingis konsiderin-

dan famon inter la kulturaj grupoj de nia lando.

**Enllaç** kiel asocio sin difinas kiel ponton inter grupoj kaj homoj pensemaj en la direkto de la klise nomataj "alternativaj" ideoj. Tiel ĝi kontaktas vastan aron da asocioj en la tuta Katalunio (largasence), same kiel ankaŭ eksterlande. **Enllaç** celas interkonigi tiajn grupojn kaj oferti al ili servojn.

Unu el la plej mirindaj atingoj de tiu asocio estas la starigo de plaĉega renkontiĝejo proksime de Vilafranca del Penedès. **Enllaç** konstruis du-etaĝan domon per internaciaj labor-brigadoj sur pitoreska monteto, kie oni povas admiri belegan pejzaĝon. La ejon uzas grupoj por siaj laboraj renkontiĝoj, kiel jam du-foje faris KEJ. La domo enhavas bonan bibliotekon kun ĉielarko da revuoj.

Ankaŭ la revuo **Via Fora!** tute indas por tia sukcesa asocio. Ĝia enhavo estas diversa, sed en ĝi abundas la longaj eseoj kaj intervjuoj. Antaŭ ĉiu rubriko staras resumoj kataluna, angla kaj esperanta. Ankaŭ la enhavo kaj la teksto prezentanta **Enllaç** estas tri-lingvaj. La grafikado staras je altega nivelo, kun oftaj plumaj desegnoj.

Nemalhavinda por kulturaj aktivuloj.

- Via Fora; ap. 85; 08291 Ripollet; trimonata; jara abono: 800 p-toj.

Fariĝu subtenanta membro de KEA



## stranga japano

**E**n la hotelo "Punta Marina", en Tossa, mi ekkonis vere strangan japanon, tute ne similan al la ideo, kiun ĝis tiam mi havis pri tiaj orientanoj.

Dum la vespermanĝo, li ekŝidis ĉe mia tablo, petinte permeson sen tro da klin-salutoj. Mi tuj rimarkis la fakton, ke li ne havas la okulojn distiritaj nek la haŭton flava. Tute male: rilate al koloro li aspektis vange roza kaj hare blonda. Mi sentis scivolecon vidi, kiajn manĝojn li mendos. Mi konfesas, ke tio estis infana sinteno, esperante, ke li venigos neoftajn manĝojn kaj alikontinentajn miksaĵojn. Nu, li mirigis min alportigante salaton -kun multe da cepo, li aldonis-, kap-kruraĵon katalunmaniere rostitan kaj poste migdalojn. Je la fino li mendis kafon, konjakon kaj ekfumis cigaron.

Mi antaŭe imagis, ke la japano manĝos kun troa, eĉ terura edukiteco, elpikante la manĝerojn, kvazaŭ ili estas horlogo-pecoj. Sed tio ne okazis: la ulo tute nature uzis tranĉilon kaj forkon kaj plen-buŝe manĝadis, sen ia atento pri manĝ-artaj formoj. Tio, ver-dire, kontraŭstaris miajn deciditajn opiniojn.

Aliflanke, li parolis katalune samkiel ĉiu el ni, sen eĉ ombro de fremdeco. Ĉi tio ne estis eksterordinara, se konsideri, ke tiuj homoj estas tre lernemaj kaj elstare inteligentaj. Tamen, tio sentigis min malpli-valora, ĉar mi konas eĉ ne unu lingveron el la japana. Indas rimarkigi tion, ke la eksterlandecon en la renkontiĝo

alportis ĝuste mi, ĉar mi kondiĉigis mian tutan sintenon -rigardojn, mansignojn, dirmanierojn- al la konkreta fakto, ke mia interparolanto estas efektive japano. Li, kontraŭe, montriĝis plene trankvila, kiel marfiŝo en salakvo.

Mi supozis, ke tiu homo eble estas reprezentanto aŭ vendanto de fotiloj aŭ ricev-aparatoj aŭ kulturitaj perloj. Mi provis ĉiujn ĉi temojn sed li apartigis ilin per larĝa brak-movo. "Mi vendas sanktulbildojn el Olot", li diris. "Ĉu restas ankoraŭ aĉetantoj?", mi demandis. Kaj li respondis, ke jes, ke la vendado malkreskas, tamen li sukcesas plu vivi.

Li komercadis tra la suda parto de la Duoninsulo, kaj li certigis, ke tuj kiam li ekhavas ripoztempon aŭ okazas festo-tagoj, hejmen oni senmanke kuras...

-Nenie kiel hejme! -li postdiris kun plenfeliĉa vizaĝo.

-Ĉu do vi loĝas en via propra lando?

-Nu... Kie mi prefere loĝu?

Ja, kompreneble, ili estas mond-irantoj kaj ĉien ajn englitas. Mi ree rigardis lin kaj mi povas certigi, ke neniu ajn detalo, ĉe la vesto aŭ ĉe la eksteraĵo, supozigis pri lia japana deveno. Li surhavis eĉ insignon de la Barcelona Futbal-klubo sur la buton-truo.

Ĉio entute estis ege suspekta, kaj mi enpensigis pri la japan-afero. Mia edzino antaŭe alportigis por si la vesper-manĝon en la hotel-ĉambron, ĉar ŝi iomete malbonfartis. Mi informis ŝin

pri mia stranga renkontiĝo, enlistigante en la rakonton miajn juĝsupozojn: timeble, temas pri spiono.

-Kaj per kio vi konvinkigis, ke li estas japano? -ŝi demandis.

Mi ekridis, eble senplezure, kun kompto pro ŝia facilanima sen-sperteco.

-Mi rekonas ilin de kilometroj... - mi respondis.

-Ĉu vere vi jam vidis multajn el ili?

-Ne, sed mi tuj rimarkas.

-Ĉu li mem diris al vi, ke li estas japano?

-Eĉ ne unu fojon. Ili ruzas...

-Ĉu iu diris al vi?

-Neniu diris, kaj neniel mi bezonas. Mia nazo plej lertas!

Ni ekmalpaciis. Ŝi ĉiam pikas min, dirante, ke mi estas suspektemulo kaj ke iun fojon mi trafos seriozan malagrablajojn. Kvazaŭ mi ne konus min mem! Ŝajnas, kvazaŭ ŝi ne volus konsideri argumentojn kaj ŝi estas nekredible infanpensa.

Tiun nokton mi dormis malmulte kaj malbone. Mi ne kapablis elkapigi la japanon. Ĉar dum ili prezentigis tiaj kiaj ili estas, kun la rideto, la klin-salutoj kaj tiu flanko rigardo, oni povos sin defendi. Tion mi esperas! Sed se ili komencos veni kun tiom da ŝajniĝo kaj falsa aspekto, ili okazigos multe da komplikajoj.

Pere Calders  
(Adapta simpligita traduko de Abel Montagut)

## Trezoro

La novelo, t.e. "mallonga literatura verko, skizanta per karakterizaj trajtoj fakton de la vivo, eco de karaktero k.s." (P.I.V.) eble estas la ĝenro plej uzata de niaj verkistoj. Tiel, la ekzisto de antologio dediĉita al ĝi tute ne estas kaprico, sed vera bezonaĵo. Des pli grava, ĉar multaj el tiuj verkoj ne aperas libroforme, sed publikigas en niaj modestaj diasporaj revuoj, kaj restas nekonataj al granda parto de la esperantista publiko.

Tiun gravecon inter aliaj komprenis Reto Rossetti, kiu jam en la jaro 1964 kaj kune kun Ferenc Szilágyi kompilis kaj redaktis **33 rakontoj-n**, antologion de kiu "Trezoro" (redaktita de Henri Vatré kaj de Rossetti mem) estas fakte reviziita, pliampleksigita kaj ĝisdatigita versio. Ne estas strange, do, ke ambaŭ havas la saman krom-titolon: **Esperanta novel-arto**. La legintoj de **33 rakontoj** trovas ankaŭ, ke pli ol duono de la verkoj tie aperintaj rekuniĝas nun en **Trezoro**, precipe tiuj de la plej modestaj verkistoj. Kiam temas pri la plej konataj, kiel Baghy, Schwartz, Szilágyi mem k.a., la redaktoroj ansta-

taŭas iliajn verkojn per aliaj, aŭ simple aldonas novajn.

Unua diferenco inter la du antologioj estas, ke ĉi-okaze ne nur kompetentaj noveloj aperas, sed ankaŭ kelkaj fragmentoj el romanoj kaj aliaj verkoj de la elektitaj aŭtoroj.

Sed la plej grava diferenco kuŝas, kompreneble, en la amplekso de **Trezoro**. Ĝi estas duvoluma antologio, entute 948-paĝa, entenanta pli ol 130 verkojn de preskaŭ cent aŭtoroj (el ili 14 virinoj), el pli ol 25 landoj. Verkoj el ĉiuj periodoj de la esperanta literaturo, sed plejparte (pli ol du trionoj) verkitaj post la dua mondmilito. Damage, ke nur tiom malmultaj noveloj el la periodo antaŭa la unua mondmilito aperas, ĉar tiuj verkoj estas vere ĉarmaj, freŝaj, simplaj kaj senartifikaj; fontoj el kiuj kelkaj el niaj junaj verkistoj devus trinki. Sed oni ja komprenu, ke multaj el la tiamaj verkoj jam por ĉiam malaperis.

Sed pri la elekto de aŭtoroj kaj verkoj, ni ja ne povas pridubi la kompetentecon de la redaktoroj. Fakte, ilia antologio reprezentas eksterordinaran okazon por provizi nian bibliotekon per riĉa

mozaiko de la esperanta prozo. Ĝi ebligas nin ekkoni la lingvajon kaj stilon de multaj diversaj aŭtoroj, en kies verkaro ni povas laŭplaĉe profundigi. Nur iomete ŝokas, ke pli ol duono el la plej junaj verkistoj (tiuj naskitaj en aŭ post 1959) estas hispanoj (kaj esperantistoj nur ekde 1981). Mi tute ne konsciis pri la graveco de la hispana kontribuo al la nuntempa esperanta novelo.

Feliĉe la nombro de preŝeraroj en la du volumoj estas neglektinda. Sed mi devas averti pri grava fuŝ-miksajĵo inter la biografioj de Pál Lengyel kaj Samuel Meyer ĉe la lastaj paĝoj de la dua volumo: preskaŭ la tuta biografio de Meyer malĝustas krom liaj nacieco kaj profesio. Malgraŭ tio, la biografioj estas ĝenerale tre interesaj.

La verko vere pravigas sian nomon; ĝi entenas brilan juvelaron el nia centjaraga literaturo.

Pedro Martín Burutxaga

- **Trezoro. Esperanta novel-arto**; red. R. Rossetti kaj H. Vatré.; eld. Hungara Esperanto-Asocio, 1989; 948 paĝoj. (mendebla en nia libroservo)

## Ni laste ricevis...

- **Dankon, amiko!**; Claude Piron (1931- ); Pro Esperanto, 1990; 40 p. 21 cm. 500 p-toj. Tuj disvendita novaĵo. Rakonto pri junulaj aventuroj. Perfekta por homoj, kiuj finis sian unuan Esperanto-kurson.

- **Frandu Piron**; Clude Piron (1931- ); 1.300 p-toj; Literatura Foiro; kasedo.

Kantoj kun gitaro de mult-flanka homo.

- **Gerda malaperis!**; Claude Piron (1931- ); Fonto, 1983; 48 p. 400 p-toj. Krim-romaneto pensita por instrui Esperanton ekde la unua leciono. Ege leginda por ĉiu lernanto.

- **Kosmo**; Solo; A.E.U., 1990; 45-turna disko;

**novajaĵo**. Ses mire plaĉaj kantoj de la andalusa muzik-gasto en nia tuja kongreso.

- **Pinta krajono**; Reto Rossetti (1909- ); Stafeto, beletraj kajeroj n-ro 2, 1959; 130 p. 20 cm. 400 p-toj. Unua memstara poemaro de fama ano de la Skota Skolo. Ne nur Schwartz-e lingvo-petola, sed alte poezia. Jen

taŭga io por la nuntempaj ĉieaj okazaĵoj:

*Homo<sup>2</sup>  
Tra l' mondo vi tajdas kun  
murda kapero,  
Ho Hom', kanibala bacilo  
de l' Tero!*

- **Plena Vortaro kun suplemento**; SAT, 1988. 1500 p-toj. Eksterordinara vortaro, prave reeldonite multfoje, kiun devas posedati ĉiu serioza progresanto.